BIBLIOTEKO
Hector Hodler

# KONTAKTO

Tutmonda Esperantista
Junulara Organizo




1

Volumo 1

1963/4

# Kontakto

**Organo de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (Junulara Sekcio de UEA)**

PROVNUMERO

**N-ro 1**
**Somero 1963**

Prezo: individua numero - **2,20 ned gld. (9 steloj)**
Jarabono (minimume kvar numeroj) -
**8 ned. gld. (32 steloj)**

*Redaktoro: Humphrey Tonkin, 7 Linnaean Street, Cambridge 38, Mass., Usono*
*(oni nuntempe formas Redaktan Komitaton)*

**Portempa administrejo,** al kiu oni sendu ĉiujn abon-kotizojn, reklamojn ktp:
"Kontakto", Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.

**Bankisto de UEA:** R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam-1.

**Presisto:** Drukkerij Zwagers c.v., Nieuwe Binnenweg 460-462, Rotterdam-6, Tel. (010) 5 66 45

**Reklamtarifo:** 1 paĝo 80 gld., kaj proporcie ĝis 1/16 paĝo.

**Estraro de TEJO:** Günther Becker, prezidanto, Schlossbergstr. 51, 6653 Blieskastel, Germanio.
Marek Pietrzak, ĝenerala sekretario, Kraszewskiego 56/7, Torun, Pollando.
Carlo Minnaja, vic-prezidanto, Viale Giulio Cesare 223, Roma 6, Italio.
Simeon Simeonov, vic-prezidanto, G. Genov 22, Sofia-C, Bulgario.
Humphrey Tonkin, redaktoro de "Kontakto" kaj kasisto, 7 Linnaean Street, Cambridge 38, Mass., Usono
Ivo Osibov, redaktoro de LJV, Sinjskih Žrtava 13, Split, Jugoslavio.
Svobodan Zlatnar, estrarano pri kulturaj aferoj, Rimska 7, Ljubljana, Jugoslavio.

**Manuskriptojn** por "Kontakto" oni sendu al la redaktoro en du ekzempleroj. Ili devas esti klare tajpitaj en korekta Esperanto, kaj ĉiuj supersignoj devas aperi laŭ ĝusta formo, se necese enskribitaj permane. Oni skribu sur unu flanko de la papero kun interlinia spaco kaj kun granda maldekstra marĝeno. Sendu materialon aerpoŝte. Ĉe leteroj destinitaj al aperigo oni sekvu la samajn instrukciojn.

**La redaktoro aparte bonvenigas** artikolojn pri temoj sociologiaj, kulturaj, sportaj kaj vojaĝaj. Li ankaŭ daŭre bezonas fotojn, kun aŭ sen artikoloj. Ĉiu materialo havu iun apartan intereson por la junularo kaj artikoloj prefere estu verkitaj de gejunuloj mem.

**LA FONDAĴO JUNULARA GAZETO** estas oficiala fondaĵo de UEA kaj ĝia celo estas subteni la gazeton de TEJO dum ĉi tiu frua periodo de ĝia eldonado. Kontribuaĵojn oni faru rekte al UEA aŭ ties perantoj, al landaj sekcioj aŭ al estraranoj de TEJO.

**Nia Kovrilo:** Novaj mondoj ... novaj homoj. De tiuj esploristoj de la 15-a kaj 16-a jarcentoj ni heredis mondon dividitan kaj esence regatan de la kulturo de unu malgranda mondparto. Sed ni ankaŭ certagrade heredis la kuraĝon kaj persistemon kaj obstinon de tiuj fruaj pioniroj. Ili trovis novajn mondojn, sed ili ne povis ne konkeri ilin — pro la mankoj de ilia propra homa naturo kaj de la civilizo kiu naskis ilin. Ni, la junularo, ankaŭ transprenu tiun persistemon, sed anstataŭ per hakiloj kaj halebardoj kaj pafiloj, ni konkeru la mondon per la mesaĝo de kompreno kaj toleremo — kaj nia batalilo estu Esperanto. La foto montras portugalan ŝipon kiu preteriras la Kabon de Bona Espero — detalo el portugala atlaso de 1556.

**ENHAVO**


Kontakto — Ankoraŭ Nova Sukceso (H.T.) . . . . . . . . 1
La Juneco en Kontakto kun la Ideo (Pietrzak) . . . . . . . . 2
Nia Esperantista Junularo Bezonas Propran Gazeton (Becker) . . . 3
El Niaj Sekcioj . . . . . . 4
Nestabila Elemento (Dietl) . . . . 6
Needzinaj Patrinoj (K. Chaplin) . . 7
1962: Mejloŝtono . . . en Nigeria Edukado (Alabe) . . . . . . 8
Pensoj pri Nigeria Edukado (Apeji) 11
Esperanto kaj la Azia Junularo (Su) 12


LANDAJ SEKCIOJ DE T.E.J.O.

BELGUJO: Van Humbeeck, Ridder Dessainlaan 3, Mechelen.
BRITUJO: Grit Howe, South Park, Gerrards Cross, Bucks.
BULGARUJO: pk. 587, Sofia.
FRANCUJO: 34 rue Vauvenargues, Marseille 7.
GERMANIO: Am Festungsgraben 53, 23 Oldenburg.
HISPANUJO: Salvador Aragay, Arce 8-2-4, Cornella, Barcelona.
ITALUJO: Gaspare Bracchi, Via Camini 54, Sondrio.
JAPANIO: 1—13 Motomachi, Bunkyo-ku, Tokio.
JUGOSLAVIO: Slobodan Nakić, Njegoseva 49, Beograd.
MADAGASKARO: 176 Route Circulaire, Tananarive.
NEDERLANDO: Kastelenstraat 231, Amsterdam-Z.
NORDAMERIKO: 30 Avenue B, New York 9, N.Y.
POLLANDO: Barbara Przybysz, Francuska 5A/3, Warszawa.
SVEDUJO: Kristoferson, Zederlundsgatan 11 B, Motala.
SVISLANDO: Claude Gacond, La Sagne (NE).



# Kontakto

## ANKORAŬ NOVA SUKCESO EN LA JARO DE LA JUNULARO

La daŭra kaj kuraĝige firma kresko de junularaj aktivecoj kiu okazis dum la pasintaj kelkaj jaroj, kaj nun kulminis en la Jaron de la Junularo estas unu el la plej interesaj aktualaj fenomenoj en nia Movado. Oni ankoraŭ ne tute kontentige klarigis, kial ĝuste nun la junularo subite komencis kune kaj inteligente labori, kaj kial rezulte aperis kaj kreskis novaj landaj sekcioj en diversaj mondpartoj — kiuj montris sin firme plantitaj kaj kies laboro alportis al la junularo novan prestiĝon. Ĝi alportis ankaŭ novan reputacion - reputacion ne por ia "junulara vervo" aŭ "idealismo" (kiuj tamen ne mankas) sed por celkonscia kaj bone orientita aktivado en la Movado. Tiu aktivado ne limigis sin al nure porjunulara agado, sed ankaŭ en la ĝenerala Movado la junularo ludas ĉiam pli aktivan rolon.

La nova prestiĝo de TEJO grandparte ŝuldiĝas al ĝiaj intimaj rilatoj kun UEA, kiu jam kelkajn jarojn kontribuis al la stabileco de Organizo kiu tamen relative spasmode kaj kun negranda sukceso vivtenis. Oni preskaŭ povus diri ke al UEA rekte ŝuldiĝas la daŭra ekzisto de TEJO, kaj se nun TEJO komencis denove stari rekte, kaj kontribui tiom al UEA kiom UEA kontribuas al TEJO, tio estas nur la logika sinsekvo de la klarvido de tiuj kiuj unue kreis la asociiĝon de la antaŭe sendependaj organizoj.

Sed la rilatoj kun UEA ne tute klarigas la mirindan progreson de TEJO precipe dum la pasintaj du jaroj. Novaj sekcioj kreiĝis, la junularo eniris novajn kampojn, kaj ekestis nova fido en la junularo flanke de la plenaĝuloj, kiuj ne plu kondamnas sed nun rekte subtenas la apartajn bezonojn kaj dezirojn de la junularo.

Kiel unu aspekto de ĉi tiu burĝonado, okazis signifa altiĝo de la nivelo de naciaj junularaj bultenoj. Almenaŭ du — "Tamen" kaj "Kial Ne ?" — atingis internacian reputacion kaj legantaron; kaj aperadis kun mirinda reguleco (io suficĉe nekutima eĉ ĉe kelkaj plej gravaj Esperanto-gazetoj) ankaŭ "Kvinpinto" el Svedujo, la HEJS-Bulteno el Hispanujo, kaj aliaj.

Sed kvankam naciaj bultenoj servas la sekciojn bone kaj fidele, TEJO ĝis nun (aŭ almenaŭ post la kolapso de la sendependa "La Juna Vivo" antaŭ sep-ok jaroj) ne havis voĉon. Nia rubriko en "Esperanto" tute adekvate liveris kaj liveras informojn al la membraro, sed ĝi ne donis al TEJO ian apartan karakteron. Ni ĉiuj konas JEB, aŭ SEJU, aŭ (nun) JEN, pere de iliaj gazetoj. Ili havas specialajn karakterizojn kaj esencan individuecon. Sed TEJO restis ia nebula organizo, neebla kontribui al la vivo de siaj sekcioj, nenion atinganta, nenion celanta.

Ni volas per "Kontakto" doni al TEJO karakteron, kaj montri ke ĝi ja ne estas inerta kaj senviva organizo. Ni celas ne simple liveri al vi en "Kontakto" nur ankoraŭ alian novaĵfoliaron aŭ anoncaron, sed veran gazeton, kies enhavo ne pritraktu simple Esperanton, sed ankaŭ tiujn problemojn, kulturajn kaj sociajn, kiuj tuŝas la junularon, kaj tiujn apartajn interesojn kiujn havas gejunuloj.

Ni scias — iom tro bone scias — ke la gazeto kostas; ni scias ke ĝi plenplenas je malbonaĵoj kaj neperfektaĵoj. En ĉi tiu numero, ekzemple, mankas materialo pri la Orienta Mondo, pri kulturaj demandoj, pri sporto. Sed kun via helpo kaj via komprenemo ni venkos ĉiujn malfacilaĵojn. Memoru nur ke "Kontakto" bezonas 1000 abonantojn ĉiujare por finance subteni sin, kaj ke ĝi bezonas bonan kaj trafan materialon. Ĉar ĝi apartenas al ni ĉiuj, ni ĉiuj kontribuu al ĝia bonfarto. Trovu por "Kontakto" abonantojn, ĉu rekte, ĉu sub nia skemo por nepagipovaj landoj. Ĉiu kolegia biblioteko abonu ĝin, ĉiu Esperantisto abonu ĝin, ĉiu esperantista junulo sentu la gazeton sia propraĵo.

Certigu, do, la estontecon de nia bela gazeto. Tiumaniere vi asekuros la estontecon de TEJO.

H.T.

# La Juneco en Kontakto kun la Ideo

**MAREK PIETRZAK,**

Ĝenerala Sekretario de TEJO

Ni vivas en aliaj landoj, plej diversajn kutimojn ni havas, ofte ni portas malsamajn kostumojn; ĉiu el ni, pro historiaj, etniaj kaj aliaj diferencoj ellaboras propran sintenon al la religiaj kredoj, filozofiaj kaj politikaj konceptoj. Tamen, krom tiuj, ŝajne multaj, diferencigaj faktoroj, ekzistas faktoroj, kiuj forte nin ligas. Ĉu vi tion iam serioze konsideris?

Krom tio, ke ni vivas en la estanteco kaj apartenas al la homaro, ni estas junaj. Sendepende de nia loĝloko, ĉu en Azio, ĉu en Afriko, Ameriko, Aŭstralio ĉu Eŭropo, la juneco estas same mallonga transira periodo en nia vivo, la juneco havas la samajn bezonojn kaj rajtojn, la samajn revojn, maltrankvilojn, aspirojn, ĝuojn. Eble ne ĉiuj estas samgrade feliĉaj, pro diversaj vivkondiĉoj, sed ni scias, ke TIO ANKORAŬ NE DEPENDAS DE NI MEM. Kiel dekkelkjaruloj ni komencas pli kaj pli konscience malkovradi la komplikitecon de l'mondo; kion ni ne farus kiam ni havas dudek jarojn! Niaj entuziasmo, talentoj, idealismo kaj persisto venkas ĉiujn barojn — maleblaj aferoj preskaŭ por ni ne ekzistas. La juneco estas nia ligilo.

La homo pli aŭ malpli frue devas difini sian lokon en la sistemo de opinioj, konceptoj. Al ni helpis tion la Internacia Lingvo. Ĝi, la alia tre forta ligilo de la internacia kolektivo, determinis nian elekton: ni troviĝis en la vicoj de la internacia Junulara Esperanto-Movado, kaj pere de ĝi ni servas al la glora ideo de humanisma internaciismo, kiu kiel aro da ideoj de egaleco, solidareco, kaj amikeco de ĉiuj homoj, nur kun helpo de la neŭtrala Internacia Lingvo ricevas akceptindan aspekton en niaj realigeblaj kaj realigataj revoj.

La juneco ĝenerale, des pli la juneco de la anoj de la Junulara Esperanto-Movado, neniel rajtigas nin trankvile kalkuli la tagojn de nia vivo kaj atendi ĝis ni perdos la rajton formale aparteni al la Junulara Movado. Ni kaj ĉiuj aliaj DEVAS kompreni, ke DE NI DEPENDAS NIA ESTONTECO. En la Movado tio signifas, ke precipe ni — junaj — certigas ĝian longedaŭran ekziston, forton, ĝeneralan utilecon. En nia aro kreiĝu novaj ideoj, en niaj vicoj edukiĝu novaj lingvouzantoj kaj modernaj gvidantoj. Tion ĉi ni povas atingi ĉiam vastigante niajn pensohorizontojn per konstanta ĉerpado de scio el la trezoro de la homa kulturo.

Antaŭ sep jaroj ĉesis aperadi ''La Juna Vivo'' — la unua memstara internacia junulara gazeto por la Esperantista Junularo, fondita en 1934. Sub la sama titolo aperadis ek de 1956 nur rubriko en la organo de UEA — ''Esperanto''. Malgraŭ tiu ĉi LJV kaj fondado de diversaj landaj kaj internaciaj junularaj gazetoj, kiuj atingadas limigitan nombron de interesitoj, sentiĝis granda bezono de vere internacia porjunulara gazeto en Esperanto. Jam en 1962 la Komitato de la Tutmonda Esperantista Junulara Organizo decidis kolekti rimedojn por eldonadi tian revuon. Nun la decido realiĝas, kiel unu el la ĉefaj punktoj de la Junulara Jaro.

Nun ''Kontakto'' ebligas al ni egalrajte kaj samgrade — dank' al Esperanto — preni la scion pri la mondo. Ĉe ĝiaj paĝoj renkontiĝu niaj juneco kaj ideoj. ''Kontakto'' ligas en si ĉiujn unuecigajn faktorojn de la Esperantista Junularo.

Mi deziras ke ni ĉiuj ĝuu ĉiujn momentojn, kiuj dum la legado donas al ni konscion de bona laboro kaj permesas konsideri nin grava internacia junulara forto realiganta la interesojn de ĉiuj junaj.



''La juneco en kontakto kun la Ideo'': bulgaraj junulinoj studas la rezultojn de oratora konkurso de BEJ



# Nia Esperantista Junularo Bezonas Propran Gazeton: Nia Internacia Gazeto Bezonas la Esperantistan Junularon

**GÜNTHER BECKER,** *Prezidanto de TEJO*

Skribante ĉi tiujn liniojn, mi ankoraŭ tute ne scias, ĉu nia plano prezenti al la Esperantista Junularo kaj al cetera publiko novan gazeton efektiviĝos ankoraŭ ĝustatempe por la ĉefaj manifestacioj de la Esperantistaro dum la Jaro de la Junularo, nome por la Kongresoj en Vraca kaj Sofio.

Tamen kiel en multaj aliaj aferoj mi fidas je niaj propraj fortoj kaj la helpo de tiuj personoj, kiuj ekkomprenis la veran gravecon de la porjunulara laboro en la Esperanto-movado — laboro, kiu malgraŭ multaj malfacilaĵoj, disvolviĝis ne sen ĝojigaj rezultoj. Estus maloportune, se laboro montriĝis laŭ la cirkonstancoj kontentiga, rezigni je ties plibonigo, ne akceptante novajn proponojn, ne kaptante freŝajn allogajn ideojn. Tia ideo fariĝante nur malfrue konkreta propono trafulmis sufiĉe ofte niajn mensojn: estis la ideo havi propran belan internacian junularan gazeton, kiu estu ankaŭ taŭga organo por montri al la ekstera mondo.

Komparante la staton de nia afero en tiu momento, kiam per la laboro en la Tria Sekcio de la Universala Kongreso de Kopenhago en 1956 ni estis atingintaj, ke TEJO fariĝis junulara sekcio de UEA, kun la hodiaŭa situacio, kiam ne nur laboras la internacia movado, sed precipe ankaŭ la Landaj Sekcioj, de TEJO, kies nombro certe baldaŭ estos 20, la tempo ŝajnas esti pli matura por eldoni nian gazeton.

Se ni ankaŭ komparas tion, kion ni publikigis en ''La Juna Vivo'' siatempe, kun ekzemple la enhavo de la TEJO-broŝuro pri la Jaro de la Junularo, ni unue konstatas, ke kompreneble estas grandaj diferencoj: ke tiam ni skizis la evoluvojon kaj ke nun ni povas raporti pri la evoluo.

Estas eble bone je tiu okazo denove prezenti almenaŭ parte tian artikolon, lasante al la leganto la certe interesajn konkludojn.

*El ''La Juna Vivo'', januaro 1957:*

*ESPERANTO BEZONAS LA JUNULARON*
*LA JUNULARO BEZONAS ESPERANTON*

*Rigardante dum kelkaj jaroj la Esperantistajn kongresojn kaj kunvenojn, oni konscias pri la fakto, ke la junularo estas reprezentata relative malmulte, eĉ se laŭnombre eble estas pli da junuloj ol da maljunuloj. Sed tamen, ĉar la junularo ja ĝenerale pli vojaĝas kaj havas ankaŭ pli da facilaĵoj, ĝi devus esti en multe pli granda nombro en la Esperanto-movado.*

*Ne nur temas pri tio, ke, ĝenerale dirite, ni devus havi pli da junaj amikoj en nia rondo.*

*Ĝuste Esperanto bezonas la junularon, ĉar la junularo devos foje transpreni la tutan laboron. Ĝi devas formi la kadron aktivan de niaj strebadoj. Ĝi devos disvastigi niajn ideojn en la tuta mondo, enpenetrigi nian lingvon en ĉiujn rondojn. Estas tute nature, ke la problemo estus tuj solvita post ĝenerala enkonduko de Esperanto en la lernejojn. Sed kvankam tiu solvo estas plej dezirinda, ni tute ne scias, kiel longe ni devas ankoraŭ atendi, ĝis kiam oni almenaŭ en kelkaj landoj efektivigos tiun nian ardan deziron.*

*Ni do devas agi laŭeble plej aktive por gajni la junularon, por altiri junajn amikojn al niaj rondoj. La fondo de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo por tiu celo jam estas granda paŝo antaŭen. Ĝi donas al la junularo pli da eblecoj ol ĝis nun memstare labori kun pli granda efiko.*

*Jam hodiaŭ ni komencu!*

*Dirante, ke Esperanto bezonas la junularon, ni devas scii, ke tie estas nur unu flanko de la problemo, ke vere hodiaŭ pli ol iam la junularo bezonas Esperanton. Studante kiel edukisto la situacion en kiu troviĝas la junularo de la mondo, oni kun granda bedaŭro konstatas, ke ĝi grandamase perdis la senton por altaj idealoj, ke ĝi estas sur vojo kiu nur povas konduki al nebona fino.*

*La kaŭzoj estas konataj: du teruraj militoj, ĝenerale malbona familia edukado kaj nesufiĉa ŝtata atento al la elstaraj edukaj problemoj.*

*Kiel multaj plenkreskuloj la gejunuloj, se ili ne havas per aliaj kaŭzoj bonan kontraŭpezaĵon rilate eksterajn influojn, nur alstrebas materiajn posedaĵojn kaj ĉiujn ĝuojn, kiujn la hodiaŭa vivo povas oferti al ili, tute forgesante pli esencajn ecojn de vera homa vivo. Estas ankaŭ tiuj kiuj demandas, ĉu oni povas fariĝi sufiĉe riĉa per Esperanto aŭ simile. Per tio mi jam volas diri, ke feliĉe ĝenerale tiuj tipoj ne troviĝas inter la Esperantistaro. La Esperantistoj havas kontraŭe tre altajn idealojn kaj oferas ankaŭ multe da mono por tiuj idealoj.*

*Estas ĝojige konstati, ke en multaj tiaj rilatoj ankaŭ nia Esperantista junularo distingas sin esence de la cetera. Se oni post tre detala trastudo de la problemaro povas nur veni al tiu konkludo, certe estiĝas la grava demando, kia estus la tuta junularo, se oni edukus en kaj per Esperanto. Profesoro D-ro Ivo Lapenna en sia festparolado en Kopenhago ĝuste konstatis, ke la Internacia Lingvo estas esence, laŭ la naturo mem de la afero, ligita al ideoj. Nur aludante al la minimumaj ideologiaj elementoj de Esperantismo, kiujn li difinis per: egaleco de ĉiuj rasoj kaj nacioj, tuthoma solidareco kaj respekto al la homaj rajtoj, kaj libereco, ĉar nur en plena libereco floras la egaleco kaj fortikiĝas la solidareco, ni ne povas eĉ imagi, kian spiritan resaniĝon travivus la tuta homaro post ĝenerala disvastigo de tiu ideologio ligita rekte al Esperanto, ne parolante pri la aliaj valoroj de Esperanto por la kompleta solvo de la lingva problemo kaj por la eduko en pli malvasta senco.*

*Ni do ne preterlasu unu okazon por varbi novajn amikojn junajn por niaj ideoj; ĉar LA JUNULARO BEZONAS ESPERANTON.*

**Usono:**


## JUNULARO — ĈU VALIDA KONCEPTO ?

Ni ĉiuj scias, kio estas junulo: juna homo. Estas tiu -aro kiu sugestas, ke la junaj homoj de iu nacio povas esti iamaniere klasifikitaj, kvazaŭ aparta socia fenomeno havanta iel apartan rolon en la kulturo. En multaj landoj, kiam oni parolas pri ”la junularo” tio efektive signifas ”la studentaro”, ĉar universitatanoj ja havas certgradan potencon en naciaj politikoj, moraj evoluoj ktp. eĉ dum lernadaj jaroj, kaj ofte agas pli-malpli kolektive por protesti kontraŭ maljusto aŭ filistreco flanke de ”olduloj”.

En Usono tia junulara spirito iom mankas, ĉar — pro certaj kvalitoj de la usona kulturo — oni ofte trovas junulojn, kiuj jam posedas oldule fiksitajn ideojn tiel forte mensregantajn, ke preskaŭ nenia diferenco videblas inter la aĝoj 20-90 ! En Usono, la ĉefa problemo de la tipa junulo estas la eventuala atingo de iu mistera *sukceso*, kaj tio instigas al precipe mondecaj atingrimedoj — simple pro tio, ke la ideo de ”sukceso” estas konkrete bildigita enmense jam de tre frua aĝo. Tamen, eĉ en Usono estas koheraj junularaj agadoj; la plej notinda nuntempe estus la porpaca movado — tre ekstertipa montriĝo de la tradicia junulara spirito.

En la E-movado ankaŭ ni havas junularan spiriton: kiam TEJO fondiĝis antaŭ la Dua Mondmilito, ĝi fondiĝis kiel sendependa organizo, kaj nur poste kuniĝis kun UEA. Alivorte, la olduloj ne diris — Karaj junuloj, ĉu ne estus oportune ke ni havu sekcion speciale por vi ? — Ne ! La gejunuloj mem vidis la oportunecon. Jen estas tia tradicia junulareco pri kiu mi parolas ! La samo okazis koncerne JEN (Junularo Esperantista de Nordameriko), kvankam esperantista junularo en Usono aperis komence iom groteske, kiel mikrokosmo en mikrokosmo. Tamen eĉ malmultnombreco havas sian avantaĝon: koncentrigita energio. Historie gravega religio fondiĝis de nur 12 homoj, el kiuj nur kelkaj estis vere aktivaj ! Koncentrigita energio . . . .

*(daŭrigo sur la kontraŭa paĝo)*




### JAPANUJO

* **Du anoj de TEJO anoncis sin por la IJK de Vraca.** Ili intencas revojaĝi hejmen tra Usono. La lastatempa fondiĝo de JEJO kaŭzis grandan intereson tra la tuta Esperantista junularo — kaj donis al TEJO finfine sian unuan azian sekcion.

### NEDERLANDO

* La komitato de TEJO en majo aprobis proponon ke la **20-a Internacia Junulara Kongreso okazu en Amsterdam,** laŭ invito de nia nederlanda sekcio. La 20-a estos la sesa nederlanda IJK, kaj oni planas specialajn aranĝojn dum la Kongreso por festi la 25-an datrevenon de la fondiĝo de TEJO.

### USONO

* **La mirinde aktiva JEN dufoje kunvenis lastatempe.** Kiel gastoj de la Esperanto-Klubo de Haryard, pli ol 30 gejunuloj kunvenis ĉe Cambridge, Massachusetts, en aprilo, kaj okazis gravaj estrarkunsidoj. Ĉe la belega strando de Fajrinsulo, apud Novjorko, JEN denove kunvenis la semajnfinon de la 10-a de junio, kaj, inter naĝado kaj strandumado, okazigis kurson por komencantoj sub la gvido de Humphrey Tonkin kaj seminarion por literaturamantoj sub Joel Silverman. JEN venontfoje kunvenos ĉe la ELNA-Kongreso en Pittsburgh.

* Krom siaj kunvenoj, JEN ankaŭ funkciigas sian propran **libroservon** (kun kelkaj centoj da titoloj) kaj eldonas t.n. **”Kompletojn”** kun ĉiu bezonata instrumaterialo por izolita komencanto — je tre favora prezo. La Klubo ĉe Harvard funkciigas propran tutnacian **korespondan kurson,** kaj per la rezulta enspezo ĝi subtenas sian ampleksan programon de aktivecoj — kaj ankaŭ liveras la solan malaltkostan korespondan kurson en la tuta usona Movado. La kurson oni reklamas en la nacia gazetaro.


* Bernard Stollman, juna novjorka advokato kaj fervora esperantisto, finfine komencis realigi tiun revon de ĉiuj junaj geesperantistoj — **bonaj modkantaj diskoj en Esperanto.** La unuaj du tiaj diskoj baldaŭ aperos — kun kantoj kiel ”La Haŭnd’ ”, ”Lasu do, Romeo”, ”Nun ek al danc’ ” kaj ”Jes, OK, vi venkas nun”.

---

”En Usono, la ĉefa problemo de la tipa junulo estas la eventuala atingo de iu mistera *sukceso*”. La nuna nombro de studentoj en Usono superas 3.700.000, kaj tiu nombro daŭre pligrandiĝas.



Diras Stollman — Ni klopodis konservi la usonecon de la kanzonoj, kvankam kantante ilin en Esperanto. Baldaŭ la tuta Esperanto-movado dancos la Haŭndon . . . . . Kio estas la Haŭndo ? Respondis Stollman — Aŭskultu la diskon !



### HISPANUJO

* **Denove HEJS ekskursis,** kiel montras nia foto. Ĉi-foje, tamen, duono de la ekskurantoj perdiĝis, kaj nia raportinto bedaŭrinde ne informis ĉu entute ili ĝis nun retroviĝis ! Ni fidas je esperantista persistemo . . .

### AŬSTRIO

* **Aŭstria Esperanto-Junularo** oficiale fondiĝis komence de majo ĉe la jarkonferenco de la Aŭstria Esperanto-Federacio en Steyr. Kerno de la nova sekcio, kiu sekvas la sekciojn de Japanio, Usono kaj Belgujo, fonditaj en 1962, estas junularaj grupoj en Linz kaj Vieno, kiuj ambaŭ havas po 20-30 aktivajn membrojn. La sekcio disponos pri regula rubriko en la nacia Esperanto-gazeto. En la kadro de la jarkonferenco de AEF okazis ankaŭ Oratora Konkurso.

### BRITUJO

* Ĉe la 47-a Brita Kongreso de Esperanto ĉe Hastings, elektiĝis **nova Sekretario de JEB,** Terence Page — konata aktivulo jam de kelkaj jaroj, studento ĉe Cambridge kaj siatempe Sekretario de la 17-a Internacia Junulara Kongreso ĉe Wokingham.

* La verva gazeto de JEB. ”Kial Ne ?”, lastatempe eĉ trafis aktualajn modojn, aperigante en sia januara numero la vortojn kaj muzikon de la **”Esperanto-Tvisto”** (”La brakojn svingu kaj la plankon pistu — Esperant-tvistu !”)

EL NIAJ SEKCIOJ

**Nederlando:**

## FRUMATENE . . . .

Certe iam estos skribita la historio de TJO/TEJO. Ĝi estos bunta rakonto pri alta strebado, pri sukcesoj kaj malsukcesoj, entuziasmaj planoj, kuraĝaj faroj, seniluziiĝoj, endormado kaj ĉiam denove vigla reaktiviĝo. En tiu rakonto Nederlando estos ofte menciata. En Nederlando TJO fondiĝis . . . Ofte la nederlandaj junaj esperantistoj revigligis la internacian organizon . . .

Fiero pri grandioza historio ofte servas por kamufli la hontindan nunon. Mi estas certa ke vi ne lasas vin trompi de miaj pompaj vortoj; do mi estu tute honesta: la nuna stato de TEJO-Nederlanda Sekcio estas vere tre malbona. Eble eĉ la vorto ”stato” ne taŭgas en la lasta frazo; stato ja estas etimologie ligita kun *stari*. Pli bone ni parolu pri la *kuŝo* de la Nederlanda Sekcio. Ĝi ankoraŭ ne vekiĝis el la ”vintra dormado” kiu komenciĝis en 1961 ! Antaŭis kvar-kvin jaroj de entuziasma laboro; aktiva kaj insista propagandado per diversaj rimedoj kaj sur pluraj terenoj ne restis senfrukta. Dum la jaroj 1959/1960 aperadis la stencilita monata organo ”Trumpeto”, funkciadis Gazetara Servo, kiu regule sendadis bultenojn al nederlandaj junularaj kaj lernejaj gazetoj.

Depost 1961 fakte nur la sekretaria kaj propaganda fakoj vivas. Esperige tamen estas ke kelkaj personoj sincere bedaŭras tiun situacion, kaj eble do baldaŭ iu trovos la sorĉan formulon per kiu oni povos veki la Nederlandan Sekcion. Se tiu vekiĝo okazus en ĉi tiu jaro, en la Jaro de la Junularo . . . Sekvontjare la Universala Kongreso estos en Hago; ni invitis la Internacian Junularan Kongreson al Amsterdamo. Ofte la kongresoj donis novan sangon al anemia landa asocio. Ni esperu ke sekvontjare ni vidu la saman efikon en Nederlando. Grave estas ke la Nederlanda Sekcio ne estas la nura invitanto; ĝi faris tion inviton kune kun la Direkcio de la Internacia Junularcentro Anne Frank Domo en Amsterdamo. Eble la 20-a IJK do okazos en la historia Postdomo !

Tre frue mi ellitiĝis por obei la ordonon de nia Redaktoro ke mi skribu artikolon. Mi ne grumblas al li; dank’ al tiu ordono mi kunvivis la naskiĝon de multpromesa maja tago. Taŭga sfero por revi pri la baldaŭa renaskiĝo de TEJO — Nederlanda Sekcio!

ADRIAAN DEN HAAN

---

Ĉu la junulara movado nur aĝe diferencas disde la ”oldula”? Memevidente ne. Ne forgesu, ke gejunuloj facile enuiĝas (ne subtaksas) sed laŭnature enuiĝas pro troa ripetado de la samaj ideoj. Minimume do, ili tendences nove esprimi la malnovon, se ne efektive krei novon ! Ĉu ili tiel emas pro malrespekto, spitemo, trofiero, detruemo ? Tute ne. Ili devas tiel agi — ĉar tio estas juneca psikologio, tiel obstina kiel la rotacio de la tero — kaj sen ĝi estus nenia progreso, ĉu en nia movado, ĉu en iu alia mondafero. La konversacio, la pensmaniero, la ag-metodoj, la gazetaro, kaj eĉ iomete la lingvo mem de la junularo esence distingiĝas de la oldularo.

Banale estas ripeti la memevidentan fakton, ke la junaj esperantistoj de la nuntempo estas la estonta movado. La TEJO-uloj de la aktuala momento morgaŭ estos UEA-uloj — ilia malapero estas preskaŭ absurda ideo, ĉar ĉu vi ne scias, kara leganto, kiel nia lingvo sin kroĉas en homaj mensoj kaj koroj ? En la vortoj de la senmorta Doktoro Mizantropo, — estas malfacile mallerni la lingvon ! Ne, ĉi tiuj junuloj ne malaperos. Ĉu vi ne interesiĝos pri TEJO dum la aktuala Jaro de la Junularo ?

KEN MINER

# Nestabila Elemento

## Jaroslav Dietl

Stanislavo Korĵinek konsideris fraŭlinojn nestabila elemento kaj supozis, ke rilate al ili oni devas montri atentemon kaj singardon. Kaj plue li opiniis, ke al li — al profesia respondaganto — estas destinite tute ne edziĝi, aŭ edziĝi je fraŭlino politike kaj idee konscia. Tial, se iu fraŭlino kuraĝis ekrideti al li, li tuj demandis ŝin, ĉu estas al ŝi konataj kvin fundamentaj trajtoj de imperialismo, aŭ kion ŝi povas rakonti pri subpremado de la boksista ribelo en Ŝanĥajo, aŭ kiumaniere oni distingu inter superproduktado kaj kromvaloro?

Tamen, la fraŭlinon kiu estus kapabla respondi al ĉi tiuj demandoj li ne renkontis. Pro tio, Stanislavo Korĵinek pli kaj pli konvinkiĝis pri sia opinio, ke fraŭlinoj estas plejparte nestabila elemento kaj ke amo estas grandparte neinda politika kompromiso.

Kaj jen, iun belan tagon, kiam Stanislavo tramveturis, okazis io terura. Li levis la okulojn for de la gazeto kaj preskaŭ svenis. Antaŭ li staris nestabila elemento kun orkoloraj bukloj kaj kun kaŝtankoloraj revemaj okuloj. Li tuj perdis sian tutan prudentecon kaj rememoris nenion el la kvardek punktoj de sia referaĵo, kiun li tiel bone kaj fundamente preparis por la venonta tia okazo. Kaj, kvankam sur la jaketo de la belega nekonatino forestis iu ajn insigno montranta ŝian apartenon al ia amasa organizaĵo, li ne povis forturni de ŝi la okulojn. La tramo ekveturis kaj ĉi tiun fojon Stanislavo mem montris nestabilecon. Li ekŝanceliĝis kaj senintence faligis monon el la mano de la nekonata fraŭlino. Malleviĝinte li reprenis por ŝi la disŝutitajn monerojn. La rekompenco al li estis ĉarma rideto de la belega nekonatino.

— Eble vi scias kie mi devas eltramiĝi por trafi la komercan filion? — demandis al li la fraŭlino.

Stanislavo Korĵinek kun ĝojo respondis, ke li eltramiĝos en la sama loko. Laŭvere, lia laborloko troviĝis tute en kontraŭa direkto.

Do! Stanislavo Korĵinek paŝadis kun la belega nekonatino kaj ŝi senĝene rakontis al li, ke ŝi laboras en la vendejo de sia patro kiel vendistino. Ĉe ĉi tiuj vortoj li denove preskaŭ svenis, konstatinte ke li konversacias kun reprezentantino de la etburĝaro. Tamen, Stanislavo iom pliviglĝis, kiam ŝi deklaris, ke ŝia patro decidis aniĝi al kooperativo kaj de nun ŝi laboros en iu alia vendejo. Tiel Stanislavo Korĵinek akompanadis la belegan fraŭlinon, afable respondis je ties demandoj kaj, per voĉo kiun neniel rekonus tiuj kiuj kutime aŭskultadis liajn raportojn, li aranĝis postan rendevuon kun ĉi tiu pli ol nestabila elemento.

☆

La tagon kiam okazos la rendevuo, Stanislavo demandis sin — Ĉu mi, liberigita respondaganto, havas rajton paroli kun fraŭlino kiu tiel nebule komprenas la servutulan ŝtatordon? Kvankam ŝia rideto estas ĉarma, ŝi certe donis neniajn promesojn en la laborkonkuro. Kaj kvankam ŝiaj okuloj estas radiantaj, ĉu ŝi akurate pagas membrokotizojn?...

Per tia meditado turmentiĝis Stanislavo Korĵinek, kaj finfine li decidis, ke al la rendevuo li ne iros kaj ke anstataŭe li preparos raporton pri la temo: "Kiel ne forŝiriĝi de la popolamasoj". Li venis hejmen kaj eklaboris. Sed kvankam lia rigardo estis fiksita ĉe la papero sur la tablo, tamen liaj pensoj flugpendis ĉirkaŭ la benko en la parko. Tiel li sidis tutan horon kaj sukcesis skribi nur unu unikan frazon, jene: — Estimataj gekamaradoj! Ĉe nia hodiaŭa kunveno mi volas rimarkigi ke ŝia rideto ĉarmas kaj ke ŝiaj okuloj estas radiantaj. Plu li nenion sukcesis skribi: li ne kapablis.

En tia stato trovis lin la patrino. Ŝi tralegis ĉi tiun frazon kaj atente aŭskultis la nekoncepteblan konfeson pri la terura dikotomio inter fraŭlinaj bukloj kaj la kvin fundamentaj trajtoj de imperialismo. Kaj je tio ŝi tralegis al li, por tiel diri, koncizan raporton je la temo: "Kiel ne forŝiriĝi de la popolamasoj". Poste, Stanislavo, farante neniajn konkludojn kaj donante neniujn promesojn, surmetis rapide sian jakon kaj ekkuris en la direkto de la parko, timante nur ke li trovos la koncernan benkon libera...

Feliĉe, li alkuris ĝustatempe...

**tradukis: Solomono Cins**



# Needzinaj Patrinoj: Usona Socia Problemo

## Katherine Chaplin

La tuta problemo de needzina patrineco nuntempe ricevas multege da atento en la usona gazetaro kaj aliloke. Oni nature konkludas ke tio ŝuldiĝas al iu konsterna kresko de nelegitimaj naskoj. Sed tio ne estas precize vera. La Nelegitima Proporcio, aŭ taksita nombro de nelegitimaj naskoj en ĉiu milo da vivaj naskoj kreskis de 38,4 al 49,6 inter la jaroj 1938 kaj 1958. Tio ne sufiĉas por klarigi ĉi tiun intereson, ĉar la kresko estas proporcie iom malgranda kaj eĉ ĉi tiun ŝajnan kreskon oni devas konsideri en ligo kun pliboniĝo de la informado pri nelegitimaj naskoj okazintaj dum ĉi tiu sama jarperiodo.

Eble la ĉefa kialo de ĉi tiu interesiĝo estas la ĉiam pligrandiĝanta konstato ke la problemo ne povas esti tiel facile klarigita kiel oni antaŭe pensis. Dum la fruaj jaroj de nia historio la needzina patrino estis konsiderata simple kiel "malĉasta virino" kaj rezulte ricevis publikan vipadon. Ĉi tiu morala orientiĝo, kvankam en malpli puna formo, persistis tra la 19-a jarcento, je kiu epoko oni starigis hospitalojn por tiaj patrinoj kun la duobla celo flegi ilin dum akuŝado kaj alstrebi ilian moralan kaj religian reformon. La alveno de la teoriaro de Freud transigis la emfazon al psikologio kaj oni antaŭsupozis ĉiujn needzinajn patrinojn emocie nestabilaj.

### Diverseco de Kialoj

La unua vere scienca studo de la tuta problemo je ampleksa skalo okazis en Kalifornio en 1960, sub gvido de Clark Vincent. Ĉi tiu studo pruvis eksterdube la neadekvaton de tiuj ĉi antaŭaj klopodoj klasifiki needzinajn patrinojn aŭ atribui la problemon al unusola kaŭzo. Oni trovis ke ĉi tiuj junulinoj estas plej diversaj laŭ moralaj, psikologiaj kaj sociaj karakterizoj; sed oni ne povis ne scivoli kial precize ĉi tiuj junulinoj kaj ne aliaj similaj al ili, fakte fariĝis nelegitime gravedaj. La rolon de psikologiaj kaj moralaj faktoroj oni ne povis ignori, sed tiuj kiuj studis la problemon ekcerbumis por trovi ankoraŭ aliajn, pli adekvatajn, kialojn.

Fakuloj nun komencas pridemandi la respondecon de la socio mem pro la ekzisto de la problemo. Oni studas do la eventualan influon de kulturaj kaj sociekonomiaj faktoroj ĉe la junulinoj. Dum eksteruloj rapidas kulpigi needzinajn patrinojn (kiuj pro la timo de tiu juĝo suferas ankoraŭ plian problemon de sekreteco kaj sinkaŝo) estas eble ke tiuj eksteruloj mem kontribuis al la kaŭzoj.

La rapideco al juĝado flanke de la socio povas esti facile komprenita. Needzina patrino kontraŭas unu el la fundamentaj valoroj de Okcidenta socio, nome ke oni rajtas al patrineco nur interne de leĝe sankciita geedziĝo. Tia kontraŭo estas atako kontraŭ tiu valoro kaj ĝi incitas fortan reagon. Sed tiuj juĝantoj ne konsideras la ekziston de konfliktaj valoroj en la usona kulturo, kiuj malhelpas ke junulinoj kaj iliaj gepatroj starigu normojn de agado kiuj certigos ilian retenon en la kadro de akceptitaj sociaj moroj.

Dum la "Viktoriana epoko" (la 19-a jarcento) publika diskutado pri seksaj moroj estis tabua, kaj junulinoj havis tre malmultan liberecon. Nun ŝajne la kutimoj atingis la alian ekstremaĵon. Kiel ni ĉiuj scias (ĉar tia situacio regas ne nur en Usono) lastatempaj studoj montris grandan pliofitiĝon de antaŭgeedziĝaj kaj ekstergeedziĝaj seksaj rilatoj. Tamen, nia socio multe pli facile toleras tiajn rilatojn ol tiajn gravediĝojn. Ne estas do surprize ke multaj tiaj junulinoj kredas ke la sola diferenco inter ili kaj la aliaj estas ke ili kaptiĝis. Kompreneble, estas ioma vero en tio. Kaj per tia kredo ili montras la konfuzon kiu nuntempe ekzistas en usona socio ĝenerale.

### Emfazo de Distrado

Alia kultura faktoro ĉe kiu oni serĉas kialojn por la problemo estas la moderna emfazo de distrado kaj amuzado kiun oni trovas en filmoj, en la gazetaro, ĉe televido ktp., kaj kiu troviĝas en iom alia formo en edukado kaj en la vartado de infanoj. Tre facile tio etendiĝas en konvinkon ke amuzo pleje gravas kaj ke la rego de impulsoj estas erara stulteco. Kaj en la socio mem regas duobla normo: kiom da atento oni donas al needzaj patroj? La sama agado kiu elvokas kritikadon kaj izoligon de la needzina patrino estas ofte konsiderata pruvo de la vireco de junulo, kaj certe estas multe pli tolerata.

La dua ĝenerala tavolo de la respondeco de la socio estas la influo de sociekonomiaj faktoroj. Multaj esplorantoj konsideras ke la tuta situacio de needzinaj patrinoj inkluzivas oftajn spertojn de malriĉeco kaj socia izoligo kaj rezulte mankon de fido pri la estonteco. Se tiuj specialistoj pravas, la komunumo havas respondecon plibonigi tiujn kondiĉojn kiuj tiel mal-

*(daŭrigo sur paĝo 12)*

# Eduka Progreso en la Nova Nigerio



*EN LA APUDA FOTO: Studentoj ĉe la branĉo de la Nigeria Kolegio de Belarto, Scienco kaj Teknologio ĉe Zaria (Norda Nigerio).*

## 1962: MEJLOŜTONO SUR LA VOJO DE PROGRESO EN NIGERIA UNIVERSITATA EDUKADO

**Anthony Alabe**

La rapideco de la edukada antaŭenigo en Nigerio estis dum la pasintaj du jaroj miriga. — Mi kuraĝas supozi — skribis la federala Ministro de Edukado — ke malmultaj homoj ĉi tie en Nigerio kaj eksterlande antaŭe kredus . . ke en 1961 kaj 1962 estus eble al Nigerio iniciati kvar novajn universitatojn, — la Universitato de Nigerio, ĉe Nsukke, en Orienta Nigerio; la Universitato Ahmadu Bello, ĉe Zaria, en Norda Nigerio; la Universitato de Ife, Okcidenta Nigerio; kaj la Universitato de Lagos, la ĉefurbo de la Federacio de Nigerio. Sed tiu historio de atingado neniam estus kompleta krom se oni scius kiel la atingoj okazis. Tiucele ni retrorigardu de la mejloŝtona jaro 1962 al la komenca punkto, ĉirkaŭ 1930.



Altlerneja edukado en Nigerio komenciĝis per la starigo de la Altlernejo de Yaba kaj la tiea Medicina Lernejo en 1930. Ĉi tiu estis la unua serioza klopodo krei en Nigerio institucion universitatecan. La Altlernejo (Higher College) donis diplomojn en Scienco, Inĝenierado, Termezurado, Agrikulturo, Arbkulturo kaj Bestkuracado al personoj rekte edukataj de la Nigeria Civila Servo. La Medicina Lernejo estis starigita por studentoj kiuj tiel havigis al si lokan medicinan kvalifikaĵon kaj fariĝis t.n. Asistantaj Medicinaj Oficuloj. Similspeca Medicina Lernejo fondiĝis multajn jarojn pli poste en Norda Nigerio sed kolapsis fine de 1962, kvankam siatempe plenuminte utilajn servojn.

De la epoko tuj post la Unua Mondmilito ĝis la fruaj tagoj de la Naciista movado en la kvardekaj jaroj, okazis multa diskutado pri la dezirindeco de enlandaj universitatoj, sed oni kontraŭargumentis tion montrante ke la nivelo de ĝenerala edukado estis tre malalta, granda plejmulto de la popolo estis analfabeta (kiel ankoraŭ hodiaŭ) kaj nur eta manpleno eniris mezlernejojn (kaj la pozicio ĉi-rilate ŝanĝiĝis tiel grandege ke la vastigo de universitata edukado fariĝis unu klopodo solvi la problemon de multnombraj novaj forlasintoj de la lernejoj). Oni do esprimis nur tre nebulan esperon ke ekzistus tiaj universitatoj "en la estonteco". Oni raportis ke Sir Donald Cameron, kiu tiu tempo estas Gubernatoro de la Kolonio kaj Protektorato (kiel Nigerio tiam nomiĝis), iam diris ke "ni antaŭĝuas la epokon kiam eblos al nigerianoj ricevi eksterajn diplomojn de iu brita universitato". La studentoj de la Altlernejo de Yaba neniam vidis realiĝon de tiu ĉi espero.

Ne estas surprize ke oni konsideris la eksstudentojn de la Kolegio malpli edukitaj ol tiuj nigerianoj kiuj edukiĝis eksterlande. Ĉar institucioj kiuj ne provizas diplomajn kursojn ja ne rajtus al favora pritrakto, do Yaba kaj la Nigeria Kolegio de Teknologio starigita dudek jarojn pli poste, donis malmultan inspiron al studentoj, kiuj verŝajne sindefendeme sentis ke ili bezonas ian diplomon aŭ atestilon kun pli granda rekono — ankaŭ ekster Nigerio.

Sed oni progresis laŭ ĝusta direkto kiam dum la Dua Mondmilito la Brita Registaro starigis Komisionon kiu poste evidentiĝis treege grava en la evoluo de unversitata edukado en Okcidenta Afriko. La Komisiono, sub prezido de Walter Elliot, havis la celojn: — Raporti pri la organizado kaj eblecoj por centroj de altnivela edukado en Brita Okcidenta Afriko kaj fari rekomendojn pri estonta universitata evoluigo en la regiono —. La Komisiono aperigis sian raporton en 1945. Rekta rezulto de la raporto estis la fondiĝo de la Universitata Kolegio de Ibadan en 1948 kaj la posta malfondo de la Altlernejo de Yaba.

### Unuaj Studentoj

La unuaj studentoj eniris la Universitatan Kolegion en Januaro 1948 — kaj konsistis el antaŭaj studentoj de la Altlernejo. Oni konsideris periodon de limigo necesa por la Universitata Kolegio, ĉar se ĝi estus sendependa ek de la komenco, la diplomoj akiritaj de ĝiaj studentoj estus tiuj de institucio nove kreita kaj kies kriterioj estus ankoraŭ nekonataj. Oni konsideris ke nova universitato ne rajtas al la pozicio de jam konata universitato ĝis ĝi pruvis sian meriton. Pro tio oni starigis la ligon de la Universitata Kolegio kun Londona Universitato, laŭ sistemo de specialaj rilatoj laŭ kiu studentoj de la Kolegio ricevis Londonajn diplomojn.

La Medicina Lernejo ĉe Yaba ne estis plena medicina lernejo kaj ĝia atestilo ne estis rekonata kiel "registra kvalifikaĵo" de la Ĝenerala Medicina Konsilantaro en Britujo. Do, tre baldaŭ oni komencis diskutojn cele al starigo de medicina lernejo ligita kun la Universitata Kolegio. Tamen, la unuaj tieaj studentoj faris siajn antaŭklinikajn studojn ĉe Yaba kaj postan instruadon oni donis ĉe la hospitaloj de Adeoyo kaj Jericho, ĝis la kolegiaj instancoj finkonstruis instruan hospitalon. Rezulte de la bonvolemo de diversaj medicinaj lernejoj en Britujo, nigeriaj medicinaj studentoj ricevis la klinikan instruadon bezonatan por kompletigo de iliaj kursoj. La nuna Universitata Instrua Hospitalo konstruiĝis sufiĉe frue por ke klinikaj studoj komenciĝu tie en oktobro 1956.

### La Nigeria Kolegio

Alia rezulto kiu fontis el la rekomendoj de la Komisiono Elliot estis la starigo en 1953 de la Nigeria Kolegio de Belarto, Scienco kaj Teknologio, kun branĉoj en Zaria, Enugu kaj Ibadan. Estis klare aŭdebla la konsterniĝo pri la manko de kandidatoj taŭgaj por eniri la Universitatan Kolegion. En la mezlernejoj preskaŭ tute mankis eblecoj por altnivela lernado; kaj mankis en la lando teknikaj kolegioj, kiuj abundas en Anglujo. La bezono de "nutriloj" por la Universitata Kolegio do postulis atenton. La Nigeria Kolegio havis tiun taskon, sed ĝi faris pli ol tio. Ĝi ankaŭ provizis specialajn metiajn kursojn kaj donis instruadon al tiuj kies ambicioj kuŝis ĉe praktika pli ol ĉe akademio laboro. Estis tie kursoj en arkitekturo, belarto, korpa

edukado, edukado, biendirektado, publika administrado, loka regado kaj farmacio, kaj la fakultato de inĝenierado de la Universita Kolegio troviĝis ĉe unu el ĝiaj branĉoj ĝis oktobro 1962.

Sed depost 1963, okazis sufiĉe rapida kresko de altnivela edukado ĉe la lernejoj, tiel ke en 1962 estis pli da studentoj ĉe la ĝusta nivelo ol la universitatoj povis akcepti. Oni do komencis Federalan Portempan Sciencan Lernejon en Lagos en 1958 por prepari studentojn de scienco kaj tiel ebligi al ili mallongigi siajn universitatajn diplomajn kursojn. Kiel ĝia nomo mem klarigas, ĝi fondiĝis kiel portempa rimedo pro la rapide kreskanta aro de novaj ekslernejanoj.

### Sendependaj Universitatoj

Ĉiam pli kaj pli evidentiĝis ke la Universitata Kolegio en Ibadan ne sufiĉas por plenumi la fortan bezonon de la lando al plene edukitaj homoj por funkciigi ĝiajn diversajn instancojn. Unu el la rezolucioj de la kvara jarkongreso de la Nacia Unuiĝo de Nigeriaj Studentoj en 1960 tre trafe diris: La nuna unusola Universitato estas absolute neadekvata. La lando bezonas nuntempe almenaŭ kvar pliajn universitatojn, unu en ĉiu regiono kaj en Lagos —. Ĉi tiu rezolucio fakte aludis al la rekomendoj de la Komisiono starigita de la Federala Registaro en 1959 sub prezido de Sir Eric Ashby. La celo de la Komisiono estis trarigardi la bezonojn de postmezlerneja kaj universitata edukado en Nigerio ĝis 1980.

La raporto de la Komisiono Ashby, aperigite en 1960, enkondukis la eraon de sendependaj nigeriaj universitatoj. La unua tia universitato estis la Universitato de Nigerio ĉe Nsukka, kiu akceptis siajn unuajn studentojn en 1960. Kaj la Universitato de Ife, en Okcidenta Nigerio, malfermis siajn pordojn en 1961. En 1962 venis klimakso al la ĝisnuna historio de universitata edukado en Nigerio, ĉar en tiu jaro okazis la malfermo de la Universitato Ahmadu Bello ĉe Zaria (Norda Nigerio), kaj de la Universitato de Lagos — la ĉefurbo.

### Aliaj Institucioj

Aliaj institucioj ekzistas en la lando, kiuj, kvankam ne de universitata nivelo, tamen provizas instruadon esence altnivelan (kutime metian edukadon kaj aliajn formojn de postmezlerneja edukado).


Studado eksterlande ankoraŭ daŭras, ĉar multaj nacioj montris sian amikecon per provizo de edukado en siaj institucioj al nigerianoj tiel dezirantaj. Pli ol 15000 nigeriaj studentoj troviĝas en Britujo, Usono, Kanado, Etiopio, UAR, Gano, Sieraleono, Sovetunio, Pollando, Okcidenta kaj Orienta Germanio, Francujo, Irlando kaj aliaj eŭropaj landoj.

Oni ne povas ne ekzameni (kvankam mallonge) la problemojn kiujn kaŭzis la evoluo de universitata edukado en Nigerio. Oni timas ke kun kvin universitatoj ekzistas tendenco al duobligo de kursoj — danĝero tamen tre bone evitita nuntempe per la kreo de Nacia Universitata Konsilantaro kun la celo akordigi la planojn kaj politikojn de la ekzistantaj universitatoj. Ankaŭ la problemo de financo akutas. Ja ekzistas stipendioj de registaraj kaj privataj instancoj, sed ĉi tiuj estas tute ne adekvataj, kaj bezonaj studentoj multas.

Malgraŭ la malfacilaĵoj de plivastiĝo, la Universtitato de Ibadan nun provas programon de postdiplomaj studoj cele al plenumo de la bezono por instruistoj ĉe eble ĉiuj universitatoj de la lando, kiuj mem ne liveros siajn proprajn diplomitojn ĝis post du aŭ tri jaroj.

Ĉi tiu superrigardo de la evoluanta historio de universitata edukado en Nigerio plej bone finiĝu per citaĵo el artikolo de Sir Eric Ashby, kiu ja ludis tre signifan rolon dum la pasintaj tri jaroj: — Nigerio eniras la plej grandan aventuron en edukado kiun Afriko iam ajn spertis. Nenio malpli granda ol ĉi tiu aventuro sufiĉus por la esperoj kaj aspirado de la nacio . . .

*SUBE: La Biblioteko de la Universitato de Ibadan.*





# PENSOJ PRI NIGERIA EDUKADO

**Sam Apeji**

La starigo de novaj universitatoj ĉe Nsukka, Ife kaj Zaria dum la pasintaj du-tri jaroj nepre igas nin en Nigerio reaprezi niajn sistemojn de universitata kaj subuniversitata edukado. Post dekkvino da jaroj, la izolo de la Universitata Kolegio ĉe Ibadan nun finiĝis. La celoj kaj agmaniero de ĉi tiuj novaj institucioj, iliaj vidpunktoj kaj rilatoj unu kun la aliaj sendube kaŭzos vastajn reeĥojn tra universitata kaj ĝenerala edukado en Nigerio.

La fruaj mezepokaj universitatoj havis kiel ĉefan celon la produktado de ĝentilaj sinjoroj kapablaj inteligente pridiskuti plej diversajn temojn kaj kiujn oni povus nomi ”kulturitaj”. Kvankam ĉi tiu bezono ankoraŭ restas, modernaj universitatoj transprenis la aldonan respondecon produkti spertajn specialistojn, precipe en teknologio kaj plej fakaj disciplinoj. Nun oni ĝenerale akceptas ke universitatoj produktu administrantojn, pensantojn, kaj gvidantojn. Ĉi tiuj ”nekulturaj” bezonoj estas tre urĝaj, speciale en la evoluantaj landoj, kie ni klopodas kunŝovi en kelkajn jardekojn la progreson kiun faris Eŭropo kaj Ameriko en kelkaj centoj da jaroj. La kutima nigeria diplomito, ekzemple, havas pli respondecan postenon ol simila diplomito en, ni diru, Britujo, kie eksuniversitatanoj multe pli abundas.

### ”Senutila Edukado”

Ĉar ni tiel rapidemas, ekzistas ankaŭ emo inter multaj homoj tute malestimi la ”senutilan” flankon de universitata edukado. Ni devas unue produkti niajn teknikistojn kaj poste, je iu nedifinita estonta dato kiam ni sufiĉon havos, ni povos turni niajn pensojn al ”senutila” edukado.

La argumento estas unuavide nerefutebla. Sed se ni pli profunden konsideras ĝin, ni konstatas kiel miopa ĝi estas. Unue, ni neniam povus havi *tro* da teknikistoj. Due, teknikistoj edukitaj en ilia propra mallarĝa kampo por plenumi iun specifan ”utilan” funkcion havas pro tiu fakto nur limigitan utilecon. La klimato de nia esence scienca epoko estas tia, ke necesas, por bone labori en la propra medio, ke oni komprenu ĝian rilaton al la ĝenerala homara strebado.

Ĉi-rilate, la plej grava fendiĝo kiu bezonas kunigon estas tiu inter estontaj sciencistoj kaj praktikantoj de humanecaj studoj. Scienca edukado ĉe la lernejoj bezonos vastan plibonigon. Laboratorioj kaj sciencaj aparatoj ofte mankas, sed ni posedas rimedojn jam kiujn ni ne plene ekspluatas. Ekzemple industrio, tia kia ĝi estas, ludas malgrandan rolon en edukado, ĉar ni ankoraŭ ne konceptas edukadon kiel vivmanieron. Male, ni konceptas ĝin kiel suplementan aldonaĵon kies plej alta celo estas la akiro de atestilo. Ĉi tiu nenecesa emfazado de paperaj kvalifikaĵoj kondukas al starpunkto kiu konsideras permanan laboron iel malestiminda. Teknikaj kvalifikaĵoj ankaŭ okupas pli malaltan lokon ol kvalifikaĵoj pure akademiaj. Ni urĝe bezonas novan socian pensadon pri ĉi tiu temo. Ni devas reekzameni niajn konceptojn kaj principojn pri edukaj kvalifikaĵoj kaj ni ne plu pensu ke la sola celo de edukado estas la livero de oficistoj.

Post adekvata preparado, la nova universitatano devus persvadiĝi al konsidero de si mem rilate al socion, kaj ne ekpensi ke li estas speciala estaĵo. Oni evoluigu lian senton de respondeco. Tion oni ne povas atingi se oni traktas lin nur kiel ian privilegian lernejanon. La stabanaro ĉe la Universitata Kolegio en Ibadan glate buŝumis al la ideo ke studentoj kaj instruistoj kune laboru kiel komunumo cele al eltrovo de la vero. Praktikaj pruvoj de ilia sincero malpli evidentis. La stabanoj havas aparte gravan taskon en la helpado de studentoj al adaptiĝo al ilia nova medio.

### Lingvaj Problemoj

Bedaŭrinde, nigerianoj kun okcidenteca edukado lernis malestimi nigeriajn aferojn. Ĉi tiu procedo firme establiĝis jam ĉe la elementa lernejo. Multaj mezlernejoj insistas ke infanoj parolu la anglan kaj punas ilin se ili parolas propralingve. Rezulte ni instruas al niaj infanoj paroli la anglan pli bone ol la angloj, dum ni igas ilin mallerni Haŭsa, Ibo kaj Yóruba — je epoko kiam la kimroj aktive disvastigas la kimran !

Ĝis la lastatempaj eltrovaĵoj de la Nokkulturo apud Jos, oni ĝenerale akceptis ke oni neniam faris en Afriko ion kulturan. Eĉ la bronzaĵojn de Ife kaj Benin, multaj el kiuj nun ornamas eksterlandajn muzeojn, oni nomis ”ne negraj”. Feliĉe, oni nun pridisputas tiun kredon.

La tuta sistemo de edukado devas formiĝi tiel ke ĝiaj produktatoj lernu rigardi sian edukadon kiel vivmanieron kiu helpas al ili akiri scivoleman menson. Tiaj mensoj komprenos la bezonon de internacia mondkoncepto, sed samtempe ili ne forĵetos siajn propraĵojn kiel senvaloraj.

Sed eduka reformo, kiel ĉio, devas komenciĝi ĉehejme. La universitatoj povas provizi ekzemplon de kunlaboro kaj kunigitaj fortoj en Nigerio. Poste povos sekvi kunlaboro inter universi-

*(daŭrigo sur paĝo 12)*

# Esperanto kaj la Azia Junularo



**Armand Su**

La lingva diverseco en Azio estas multe pli granda ol en Eŭropo. Por azianoj unu komuna lingvo estas urĝe bezonata precipe nun, kiam la aziaj landoj volas kune diskuti kaj solvi siajn proprajn problemojn, la bezono de unu komuna lingvo estas pli kaj pli evidenta. Ekzemple, en la Konferenco de Aziaj Verkistoj okazinta en 1956 en New Delhi, almenaŭ 10 aziaj lingvoj estis samtempe uzataj. Tio estas granda malŝparo de la homaj fortoj.

Nun, Esperanto jam ne plu estas utopia al azia junularo. Multaj studas ĝin kun fervoro. Esperanto pli kaj pli disvastiĝis inter la azia junularo. Antaŭ nelonge en Japanujo estis fondita Japana Esperantista Junulara Organizo (JEJO). Krome okazis kursoj por gestudentoj en Cejlono, Ĉinujo, Hindujo, Nepalo, Vjetnamio, k.a. En Taegu (Suda Koreo) estis fondita Korea Studenta Esperanto-Federacio. Sed kiel en la ceteraj aziaj landoj? Al multaj aziaj gejunuloj Esperanto estas tute nekonata kaj ili eble eĉ neniam aŭdis pri Esperanto. Ĝis nun, neniuj informoj pri Esperanto aperis en Mongolujo, Laoso, Kamboĝo kaj Afganistano. En kelkaj aliaj landoj, kiel en Turkujo, Tajlando, Filipinoj, pro malfacilaj cirkonstancoj Esperanto neniam grandskale disvastiĝis.

La azia junularo certe ne rifuzos akcepti Esperanton. Sed la problemo estas: kiamaniere ni pruvu al niaj aziaj gefratoj la utilecon de Esperanto.

Indiferento al Esperanto flanke de la ŝtatoj, mankoj de Esperanto-lernolibroj en aziaj landoj, altaj kostoj de Esperanto-eldonaĵoj, la nepagipoveco, ktp., ankaŭ malhelpas la disvastigon de Esperanto inter la azia junularo. Nun la urĝaj taskoj, disvastigi Esperanton inter nia junularo, devas esti plenumitaj de ni, aziaj Esperantistoj. Ĉar neniu ol ni pli bone konas nian propran situacion kaj nian rolon. La eksteraziaj Esperantistoj povas nur helpi kaj subteni nian laboron, sed ne ĝin daŭrigi. La fruktodonajn laborojn de S-roj Sekelj kaj Milojević, S-ino Haudebine, D-roj Neergaard kaj Sadler en Azio devas daŭrigi ne ili, sed ni — aziaj junuloj.

Tial la ĉefaj taskoj proponitaj de Prof. Lapenna ("Esperanto", 1963, p. 3) estas nepre farendaj. Se ni aziaj Esperantistoj realigos ĉion proponitan en la "Jaro de la Junularo", ni certe havos pli da junaj aziaj adeptoj de nia lingvo.

**NEEDZINAJ PATRINOJ:** *daŭrigo de paĝo 7*

fortigas ilian kapablon konformiĝi al la normoj kiujn la socio starigas.

Kiel oni tuj povas konstati, nuntempe estas pli da demandoj ol respondoj en tiu ĉi esplorkampo. Kvankam pri tio ni ne kontentas, la fakto ke oni eĉ faras la demandojn estas paŝo laŭ ĝusta direkto kaj tre diferencas de la pruda bonmoremo kiu igis homojn konsideri needzinajn patrinojn „malbonaj" aŭ „malsanaj" kaj kiu traktis ilin kiel sociajn izolitojn. Eble dum pli da personoj konstatos la komplikecon de la problemo, publika komprenemo daŭre pliiĝos. Eble eĉ la bezono de sekreteco ekmankos. Se tio ja okazos, estos nemezureble pli facile al needzinaj patrinoj reiri al la propraj komunumoj kaj fari ankaŭ siajn kontribuojn al ili kiel respondecaj civitanoj. Eble la plej vundiga elemento de ilia nuna stato estas ilia izoleco.

**NIGERIA EDUKADO:** *daŭrigo de paĝo 11*

tatoj en diversaj partoj de Afriko. Studentaj kaj instruistaj interŝanĝoj eĉ je modesta skalo estas certe realigeblaj per niaj nunaj rimedoj. Ni kuraĝigu kaj helpu niajn studentojn vojaĝi kaj tiel eltrovi Nigerion kaj Afrikon, ĉar unu el la plej malĝojigaj faktoj de nia situacio estas ke multaj afrikaj studentoj pli multon scias pri Eŭropo kaj Nordameriko ol ili scias pri sia propra lando — kaj eĉ pli malmulton pri Afriko.


**en la Junulara Jaro**

uzu la belan trikoloran glumarkon de TEJO: po 0,30 gld. (1,2 st.) por 10 markoj.







# NIA SKEMO POR NEPAGIPOVAJ LANDOJ

Duono el la naŭmila membraro de TEJO loĝas en orienteŭropaj landoj, kaj el tiuj landoj oni ne povas transsendi monon por aboni gazetojn eldonatajn en la Okcidento. Kvankam "Kontakto" ja apartenas al ĉiu esperantista junulo, tamen niaj tieaj anoj malfacile povas aboni "Kontakto"-n. Pro tio, ni decidis atarigi specialan skemon por la nepagipovaj landoj, laŭ kiu niaj okcidentaj amikoj povos donace abonigi junajn geesperantistojn el orientaj landoj. Simple sendu al ni kotizon (32 steloj) destinitan al la Skemo, donante al ni la nomon kaj adreson de persono en orienta lando al kiu la gazeto sendiĝu. Se vi ne donos al ni specifan nomon, ni mem elektos taŭgan personon kaj poste informos vin pri nia elekto. Se vi ne volas ke ni informu la ricevonton de "Kontakto" pri la donacinto de la abono, indiku tion al ni. Alikaze ni tion faros.


Ĉi tiu nia skemo ankaŭ kovros la evoluantajn landojn de Afriko kaj Azio, kie gejunuloj malmultajn financajn rimedojn havas, kaj kie la Esperanto-movado aparte bezonas helpon. Se vi ne sendas specifan adreson, indiku vian preferon de landoj.

Kvankam la Fondaĵo Junulara Gazeto ankoraŭ restos malferma, ĉi tiu Skemo estas kelkrilate eĉ pli bona maniero helpi al TEJO kaj la Esperantista Junulara dum la Jaro de la Junularo.

**Ĉiujn kotizojn por la skemo oni sendu al: Kontakto, U.E.A., Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.**

*NIAJ KONTRIBUINTOJ*

*GÜNTHER BECKER estas instruisto de franca kaj angla lingvoj ĉe mezlernejo en Sarlando, Germanio. Li fariĝis Prezidanto de TEJO en 1956. MAREK PIETRZAK studas juron en Pollando kaj estas Ĝenerala Sekretario de TEJO ek de 1961 . . . La artikolo "Nestabila Elemento" unue aperis en la soveta satira gazeto "Krokodil": JAROSLAV DIETL estas ĉeĥo . . . KATHERINE CHAPLIN estas komenca esperantistino, kiu ĵus diplomiĝis pri Socia Laboro ĉe Boston-Kolegio, Usono; KEN MINER estas ankaŭ usona, intime kunlaboris en la fondo de JEN kaj fariĝis la unua redaktoro de ties gazeto . . . ARMAND SU estas nia sola ano en Ĉinujo, kaj ADRIAAN DEN HAAN estas Prezidanto de nia Nederlanda Sekcio kaj licea instruisto. La du artikoloj pri Nigerio unue aperis en la gazeto "La Studento", al kies redakcio ni esprimas niajn dankojn. SAM APEJI kaj ANTHONY ALABE estas junaj nigerianoj; HUMPHREY TONKIN tradukis iliajn artikolojn. Ni dankas al la redakcio de "Nordamerika Esperanto-Revuo" kie la artikolo "Junularo — Ĉu Valida Koncepto?" unue aperis, kaj al ARNOLD ZACK kiu desegnis nian kovrilon: li estas arbitristo de labordisputoj kaj profesia artisto, el Boston, Usono.*


**La Internacia Afiŝo**

Kvarkolora
Moderna
Kun taŭga
blanka spaco
por nacilingva
teksto

Prezoj :

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| Formato | po 1 ekz. | 0.20 gld. | ( 0.80 steloj) |
| 41,5 × 59 cm: | po 100 ekz. | 18.— gld. | ( 72.— steloj) |
| | po 1000 ekz. | 165.— gld. | ( 660.— steloj) |
| Formato | po 1 ekz. | 0.40 gld. | ( 1.60 steloj) |
| 58,8 × 83,2 cm: | po 100 ekz. | 36.— gld. | ( 144.— steloj) |
| | po 1000 ekz. | 330.— gld. | (1320.— steloj) |

Tuj mendu ĝin ĉe la Centra Oficejo
**UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam**

# ĈU VI ĜUIS
# ĈI TIUN UNUAN NUMERON DE
# „KONTAKTO”?

— Se jes, abonu ĝin regule.
Jarabono: 8 ned. gld. (32 steloj)
— Notu ankaŭ nian specialan
Skemon por nepagipovaj landoj:
simple sendu al ni plian kotizon de 32 steloj kaj ni liveros la gazeton al persono en nepagipova aŭ evoluanta lando — laŭ via elekto.
— Certigu ke via loka aŭ kolegia biblioteko abonas la gazeton.
— Faru ankaŭ vian kontribuaĵon al la Fondaĵo Junulara Gazeto.

**MEMORU LA JARON DE LA JUNULARO !**

Administrejo: ”KONTAKTO”, U.E.A., NIEUWE BINNENWEG 176, ROTTERDAM-2, NEDERLANDO.

**VARBU**
## UNIVERSITATANOJN
per la speciala informilo de UEA kaj STELO tekstoj angla, franca, hispana, germana, rusa kaj japana.
Subskriboj de 50 profesoroj.
**MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA**
(po 0,06 gld. — 0,24 st)

T.E.J.O.

**T.E.J.O.**
**HAVAS PLI OL**
**OK MIL MEMBROJN**
**Ĉu vi troviĝas inter ili ?**
Petu detalojn pri membreco ĉe UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2 Nederlando.

## JARO DE LA JUNULARO
Speciala eldono de Pola Esperanto-Junularo helpe al la kaso de T.E.J.O.
**32-PAĜA** **PLENPLENA JE INFORMOJ**
Ĉi tiu broŝuro enhavas, kune kun mesaĝoj de ciuj Estraranoj de TEJO, plenajn informojn, adresojn ktp. pri ĉiuj landaj sekcioj, skizon pri la historio de TEJO, biografiajn notojn kaj fotojn de la Estraranoj, kaj amasegon de aliaj utilaj informoj — nepran por ĉiu aktiva Esperantisto, ĉu juna ĉu maljuna !
**AĈETU JAM NUN VIAN EKZEMPLERON**
Havebla kontraŭ *4 Steloj* (plus sendkosto) de ĉiu landa sekcio de TEJO.